

Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 12-an de majo 2016 je 19.30h per Skajpo.

Partoprenantoj: Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Mario Machlik, Amelie Matt, Hilde Dahlberg (ekde punkto 3), Jardar Eggesbø Abrahamsen (nur dum punkto 4), Herman Raner.

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 14-an de aprilo

Aprobata.

2. Ekonomio

La kasisto ne estis kontrolinta la aktualajn ciferojn. Ĝisdatiĝo venu en la venonta interkonsiliĝo.

3. Jarkalkulo

La kasisto diras, ke la jarkalkulo pretos ĉi-semajnfine. Ŝi dissendos ĝin al la estraro post malmultaj tagoj.

4. Jarraporto

Mankas ankoraŭ kelkaj nombroj. La raporto estu preta antaŭ la 27a de majo, kio estas la limdato por materialo al la venonta numero de la membrogazeto.

5. Propono por ejo de la Landa Kunveno 2017

Anne Karin Bondhus vizitis proponitan kongresejon (Hotell Sverre en la centro de Sandnes) kaj sendis al la estraro fotojn de tie. Ili havas ĉambrojn kun diversaj grandecoj, kun necesejoj. Ili rekomendas, ke oni mendu ĉambrojn plej laste en januaro por kongreso en junio.

Kondiĉe, ke la prezoj estas favoraj, la estraro aprobas la elekton.

6. Pritakso de la nova presejo por Norvega Esperantisto

La kvalito ŝajnas esti la sama kiel antaŭe. La kovropaĝo ne estas pli dika ol la aliaj paĝoj. Ĉu indas peti tion?

La decido pri "momsfritak" (menciita en antaŭaj protokoloj) estas trovita en la oficejo kaj plusendita al Jardar E. Abrahamsen.

7. Eventualaĵoj

a) Herman Raner raportas, ke li inspektis Esperantonia kaj trovis ĝin multe pli bona ol antaŭe, sed ke ankoraŭ restas kelkaj mebloj tie kiuj apartenas al Cato Haugen.

b) Pri temo al la aŭtuna Seminario ne venis proponoj de membroj. Ni invitu la tri proponitajn prelegontojn kaj vidu, ĉu iu el ili akceptos.

c) Kion sendi en la bonveniga pakaĵo al novaj membroj? Ĉu sendi la bonvenigan leteron rete kaj la reston kiam ili estas pagintaj? La kasisto opinias, ke ni estas sufiĉe riĉaj por sendi la tutan pakaĵon kune kun la ĝirilo al tiuj malmultaj, kiuj petas membrecon. Se ili ne pagos, ĝi tamen estas reklamo por NEL.

Raportis Ulf Chr. Lunde.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2045h.

Dato por la venonta interkonsiliĝo: lundo la 23-a de majo.